





tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo
Ĉasopis Hrvatskog saveza za esperanto

novembro 2016 / n-ro 128



-  UNESCO kaj la centa jubileo de la morto de L.L. Zamenhof omaĝota en 2017
-  Esperanto-eventoj en Kroatio 2016: Fužine, Hraščina, Kupa, Bjelovar
-  Premio: Infanlibro de la jaro, post Zagrebo, Osijek kaj Đurđevac al Bjelovar
-  Mortis Radenko Milošević

Jen ni atingis la lastan parton de la jaro 2016!

La somero malantaŭ ni estis iom speciala, kun **Nitra** kaj ĝia 101a Universala Kongreso de Esperanto, ekstreme riĉenhava, kiu kunligis la urbon kun la plej granda jara Esperanto-evento. Kvankam la kongresa libro montras nur 1214 aliĝintojn, la organizantoj planis, ke la unua kongreso post la 100a jubileo estu tute speciala. Kaj ĝi estis. Oni lokis la kongreson en la ĉarman urbon kaj metis la kongresanojn ĉirkaŭ la Agrikultura Universitato kaj ties verdejo. En la eta urbo ni esperantistoj pli videblas. La organizantoj akcentis tion per pluraj aranĝoj sur la ĉefa placo. Ili kulminis per la manifestacio por Esperanto, dum kiu la kongresanoj, ekipitaj per verdaj flagoj, marŝis tra la stratoj, gviditaj de laŭtaj amuzistoj kaj fotitaj de dronoj por fini la feston per publikaj lecionoj de la slovaka tango en kiu dancis ducento da kongresanoj. La foto ilustras la surstratan marŝadon por Esperanto en **Nitra**. Fotis **Anna Striganova**.



La kongreso disvolviĝis sub la slogano *Esperanto-la bunta lingvo*, kio ĝi efektive estis ekde la bunteco de la unua programero *Movada Foiro*. Al la freŝeco de la kongreso aparte kontribuis junaj vizaĝoj de pluraj helpantoj kaj novaj personoj kiu gvidas niajn esperantajn aferojn:

la nova direktoro de la Centra Oficejo **Veronika Poór** kaj ne laste la nova redaktoro de Esperanto-Revuo **Attila Kaszás**. La premion por la infanlibro de la jaro de la Belartaj Konkursoj ricevis ĉi-jare Bjelovara Esperantista Societo por la libro *La trajno en la neĝo* de Mato Lovrak, kiun esperantigis **Josip Pleadin** kaj prideseĝnis lernantoj de Elementa lernejo *Mato Lovrak* el **Veliki Grdevac**. Gratulon al la eldonistoj Bjelovara Esperantista Societo kaj Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj.

Josip Pleadin dum la UK invitis la kongresanojn al Bjelovar al INTER-FEST, organizata de kvar kroataj Esperanto-Societoj en Bjelovar en 2017.

Spomenka Štimec prelegis en Libroservo honore al la slovaka poeto **Lubomir Feldek** pri la renkontiĝo de la kroata kaj slovaka ampozio sub la titolo *Karesado antaŭ dormo*.

Kvankam oni nomas Nitran la **Bjalistoko de Sudaj Slavoj** ĉar oni kredas ke ĝuste en la monakejo de **Nitra** agis la slavaj sanktuloj kaj misiistoj en la 9a jarcento, la kreintoj de la slava skribo glagolico, **Cirilo**, denaske **Konstanteno**, kaj **Metodo**, la sudaj slavoj estis relativa minoritato en la kongresejo. La kongresa libro montras nur ses oficialajn aliĝintojn el **Kroatio** el kiu unu **Božidar Brezinščak Bagola** lingve spertiĝis en la kursoj ĉe **Katalin Kovács**.

Višnja Branković kaj ŝia firmao **Orbis Pictus** antaŭ la UK en **Slovakio**, en **Kroatio** organizis belan literaturan aranĝon OSIEK. Tiel la urbo Osijek gastigis la aranĝon kiu portas similan nomon OSIEK (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj). La aranĝo havis sukcesan reehon per du ampleksaj artikoloj en *Glas Slavonije*.

Post la kongreso en **Nitra** tri grupoj da koreoj turisme veturis al **Kroatio** kaj Kroata Esperanto-Ligo gastigis unu el ili en **Zagrebo** kaj **Hraščina** la 14an de aŭgusto.

Tiun ĉi numeron de *Tempo* financis Departemento Krapinsko-

zagorska, tial ni metas ĉi-numere la akcentojn al eventoj organizitaj de esperantistoj en Zagorje.

La festo de meteorito okazis la 28an de majo 2016 en **Hraščina**. La aranĝo ĉi-jare atingis la 20an jubileon kaj aŭspiciis ĝin la estro de la departemento, **Željko Kolar**. La ĉefa gasto estis profesoro de Filozofia fakultato en Zagrebo d-ro **Dragan Damjanović**, kiu rakontis pri la iamaj posedantoj de la bienoj ĉirkaŭ **Hraščina**, la familio de la episkopo **Josip Juraj Strossmayer**, la familio **Adrowski-Unukić**. Eleganta monografio pri la familio **Adrowski-Unukić** kaj ĝia ĉefa zagreba vilao en Jurjevska 27, kiun **Dragan Damjanović** aŭtoris, estis prezentita. Muzikis operkantisto **Ivica Kontent**.

Julie eta loko **Fužine** gastigis gajan grupon – partoprenantojn de REF, Renkontiĝo de esperantaj familioj. Raportas la organizanto **Vanja Radovanović** kaj **Jesper Jacobsen** pruntis al la titolpaĝo la foton de la sukcesa aranĝo.

La 18a lernejo de media kulturo en **Trakoŝcan**, gvidata de ĵurnalisto **Dražen Ilinčić**, filmis interjuon kun **Božidar Brezinščak Bagola** por la elsendo *Zagorpedija*. La 9-minuta programo kun mencio de Esperanto, estis prezentita la 27an de aŭgusto ĉe la fermo de la somera lernejo en **Trakoŝcan**.

En aŭgusto trafis nin informo ke en **Britio** mortis la esperantlingva verkisto, ĵurnalisto kaj redaktoro de *Monato*, **Paul Gubbins**, kiu post trijara intertraktado konfirmis sian alvenon al Renkontiĝo de verkistoj en septembro kaj kiu jam aĉetis la flugbileton por **Kroatio!** Tial la ĉi-jara Renkontiĝo komenciĝis per omaĝo al **Paul Gubbins**. Anstataŭ **Paul Gubbins** nia gasto estis D-ro **Georgo Nanovszky** el **Budapeŝto** kiu je plezuro de kvardeko da ĉeestantoj prezentis sian libron *Nano*. La prestiĝa kroata publicisto **Slavko Goldstein** parolis pri sia patro esperantisto el **Karlovac**, kiu pereis en 1941. Ďivo **Pulitika**

Fondita en 1980. Ne aperis en la militaj jaroj 1993 kaj 1994. Aperas laŭeble kvar foje jare. Jaro XXXV, numero 128 (2-2016).

ISSN 0352-1583. Tiu ĉi numero estas eldonita per financa helpo de Departemento Krapinsko-Zagorska al Esperanto-Societo **Trixini Hraščina**. *Tempo* aperas sone sur kompaktdisko ĉe Unuiĝo de nevidantaj esperantistoj. Voĉlegas Neven Kovačić.

Redakcio/Uredništvo; Eldonisto/Izdavaĉ: Hrvatski savez za esperanto/Kroata Esperanto-Ligo, Kneza Mislava 11/III, HR 10000 Zagreb, Kroatio, tel. +385 (1) 4617550, poŝ.tel. +385 (91) 4617550; esperanto@zg.t-com.hr, www.esperanto.hr
IBAN HR6124840081100881157; OIB 53992829935

Kontribuis: Višnja Branković, Božidar Brezinščak Bagola, Javier Castro, Mihaela Cik, Miguel Fernández, Gelearnantoj el Hraščina, Grozdana Grubišić-Popović, Nikolai Hohlov, Andrea Horvat, Vesna Hitrec, Jesper Jacobsen, Kikušima Kazuko – Krizantemo, Antoaneta Klobučar, Davor Klobučar, Teodora Kućinac, Zlatoje Martinov, Anto Mlinar, Vjekoslav Morankić, Olga Stajdohar-Paden, Ljubo Pavlović, Ritva Sabelli, Anna Striganova, Dalibor Šeatović, Ivan Spoljarec, Spomenka Štimec, Vanja Radovanović, Srećko Radulović, Zlatko Tišljar, Damir Vnućec.

Redaktoris: Spomenka Štimec. **Grafika aranĝo kaj prespreparo:** Ivan Spoljarec. **Presis:** Urednik d.o.o., Zagreb

Anonctarifo: 1/1 paĝo 1000kn (135 eŭroj), 1/2 paĝo 500 kn (68 eŭroj, lasta titolpaĝo 2500 kn (3.28 eŭroj)). **Abono** por 4 numeroj jare 60 kn. Por eksterlando 10 eŭroj. Unuopa numero enlande 15 kn, eksterlande 3 eŭroj.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la subskribitaj artikoloj.

Foto sur la titolpaĝo: **REF en Fužine 2016**. Fotis *Jesper Jacobsen*

voĉlegis el lia libro *La jaro 1941, la jaro kiu revenas*. Aparte plezurigis nin prezentitaj informoj el Karlovac el *Obzor* pri la 12a landa kongreso de jugoslaviaj esperantistoj kun 400 delegitoj en 1939 en kiu **Ivo Lapenna** estis elektita por prezidanto de la tutlanda Jugoslavia Esperanto-Ligo. **Olga Ŝtajdohar-Paden** parolis pri la kroatlingva libro kiun ŝi kompilis kaj kiun kunkreis kvin esperantistinoj *Pri tio mi vere fieras*. **Mihaela Cik** legis ĉapitron de **Vesna Hitrec** en sia esperanta traduko. **Božidar Brezinščak-Bagola** prezentis novan libron de **Spomenka Ŝtimec**, ĉi-foje la kroatlingvan *Dom u Srednjoj Europi*, kiun eldonis Literatura Societo de Hrvatsko Zagorje kunlabore kun Esperanto-Societo *Trixini* el **Hraščina**. La libro renkonte al la jaro 2017, kiam esperantistoj omaĝas al **Lazaro Ludoviko Zamenhof**, okaze de la centa jubileo de lia morto, prezentas la kroatlingvan enrigardon al la verkoj de **Spomenka Ŝtimec**, kutime verkanta en Esperanto. La titolpaĝon kontribuis pentristino **Zvezdana Jembrih** kaj dezajnistoj **Ivan Špoljarec**. La libro estis eldonita sub la signo de Kroata komisiono pri UNESCO, kiu aŭspicias la programojn honore al Zamenhof en 2017 en **Kroatio**.

Pri la literatura evento en **Hraščina** informis *Zagorski list*, *Radio Stubica* kaj *Radio Marija Bistrica*, *Radio Sljeme* en sia elsendo CroAsan kaj *TV Mreža* filmis intervjuon kun **Spomenka Ŝtimec**.

Kroata Fervoja Esperanta Asocio rekomencis la aŭtunan sezonon en siaj ejoj Trnjanska 11 F per prelego de D-ro **Zlatko Hinšt**.

En Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** por la aŭtuna sezono en septembro gastis **Zdravka Metz** el **Kanado**.

En septembro la estrarano de **KEL Dalibor Ŝeatović** plukleriĝis ĉe la kursoj de D-rino **Ilona Koutny** en la Universitato **Adam Mickiewicz** en **Poznano**. Li prezentas al ni ĉi-numere la urbon de siaj esperantaj studoj. La estraranino **Kaja Farzsky** pro profesia perfektigo translokiĝis al **Bruselo** por dujara restado.

La **KEL**-estraro kunsidis en **Hraščina** la 17an de septembro 2016.

Davor Klobučar diligentis por plibonigi nian retejon ĉe www.esperanto.hr. Bonvolu vidi tie multajn novaĵojn!

Bona novaĵo venis al Kroata Esperanto-Ligo de la nova estrarano pri kulturo de Universala Esperanto-Asocio **Sara Spanò**, kiu informis nin

ke ni ricevis la ĉijaran bibliotekan apogon el la **Fondaĵo Bachrich** de 157,50 eŭroj. Ni petis per la biblioteka apogo helpon por aĉeti la Oklingvan medicinan vortaron de la kroata esperantisto kaj latinisto **Jozo Marević** por nia biblioteko.

Multaj homoj helpis por vivteni **Vodnikova 9** kaj nian Esperantuojn! Bonvolu vidi la koncernen paĝon.

Pupteatra Internacia Festivalo lanĉita en 1968 de Studenta Esperanto-Klubo atingis sian 49an vivojaron per la malferma aranĝo la 13an de septembro 2016 de kazahstana teatro. En la venonta jaro oni festos jam duonjarcentan kontinuan daŭron de la pupa festivalo kiun siatempe inciatis junaj zagrebaj esperantistoj!

Studentino **Andrea Horvat** volontulis en **Rio** ĉe Paraolimpikaj ludoj kaj profitis la okazon por renkonti brazilajn esperantistojn. Legu pri ŝiaj travivaĵoj!

Esperantistoj el **Bjelovar** preparis riĉan programon Esperantistoj el **Bjelovar** al sia urbo la 22an kaj 23an de oktobro kun tri ekspozicioj kaj simpozio. La ekspozicion *Esperanto sur poŝtmarkoj* prizorgis **Željko Saks** kaj la fotoekspozicion *Floraj motivoj* **Berislav Rubčić**.

La unuan fojon ekster **Serbio** gastis ekspozicio de objektoj de **Tibor Sekelj** kolektitaj dum liaj veturoj al **Aŭstralio** kaj **Papuo-Nov-Gvineo** dum sia vojaĝo en la sepdekaj jaroj. La objektoj estas gardataj en la urba muzeo en **Senta** en **Vojvodino/Serbio** kaj ĝin gastigis la Urba muzeo de **Bjelovar** sub la titolo *Manpleno da mondo*. La konstantan ekspozicion en **Senta** prizorgas **Attila Pejcin**. En **Bjelovar** gastis ankaŭ la vidvino de **Tibor Erĵi Sekelj** kaj lia nevino **Ljiljana**.

Paralele al la ekspozicio en Urba muzeo okazas simpozio *Omaĝo al Tibor Sekelj*, kun partoprenantoj **Zlatoje Martinov**, **Đorđe Dragojlović**, **Juraj Bubalo** kaj ĉina ĵurnalistino **Yu Jinchao**.

Posttagmeze okazis en **Bjelovar** la 4a deklamkonkurso kaj oni prezentis poemaron *Miniaturaj de Milica Ježovita*.

Esperanto-Societo **Tibor Sekelj** invitis preleginton **Juraj Bubalo** gastis por la membroj de **Tibor Sekelj** en 2017.

Esperanto-Societo *Trixini* prezentis la novan kroatlingvan libron de **Spomenka**

Ŝtimec kaj parolis pri la esperanta literaturo dum la kroata monato de la libro en **Zagorje**, respektive en **Krapina** la 3an de novembro, en **Klanjec** la 4an de novembro kaj en **Donja Stubica** la 11an de novembro. Literatura hiŝa (Literatura Domo) el **Maribor** invitis ŝin gasti en **Slovenio** kun la nova libro la 8an de decembro 2016.

Inter du lastaj aperoj de Tempo la zagreba Esperantujo perdis du gravajn membrojn: la 23an de aŭgusto en Zagreb mortis en sia 74a jaro tre aktiva kaj meritoplana kroata esperantisto kaj sponsoro de pluraj eventoj, **Radenko Milošević**, kiu vicprezidis Kroatan Esperanto-Ligon de 1992 ĝis 2014.

Samtage la internacia Esperanto-Movado perdis sian plej eminentan scienciston, nobelpremiiton **Reinhardt Selten**, kiu gajnis la Nobel-premion pri ekonomiko en 1994, kun du usonaj kolegoj. Li gajnis la Nobel-premion pro sia kontribuo al ludoteorio.

Blanka Pavlović-Devčić la granda sponsoro de la kroata esperanta Movado, kiu speciale multe kontribuis al nia ejo en **Vodnikova 9**, forpasis la 12an de oktobro 2016.

Esperanto Societo **Rijeka** perdis sian membron **Adem Morankić**.

Dankon al ili por ilia multjara kaj valora kontribuo al la Esperanto-Movado!

Ni anoncas nian decembran Zamenhof-feston en la *Hungara societo Ady Endre*, Martičeva 8, la 15an de decembro 2016 je la 18a 30, kiam honore al **Zamenhof** prelegos gastpreleganto el **Hungario** D-ro **Georgo Nanovszky**. Bonvenon al la Zamenhof-prelego kaj al la kutima tuj posta vespermanĝo por adiaŭi de la jaro 2016! Bonvolu anonciĝi por la decembra vespermanĝo al la telefono 091461750.

Bonan legadon!

Spomenka Ŝtimec

Gratulkarto de gelernantoj el Hraščina



La centa jubileo de la morto de
Lazaro Ludoviko Zamenhof
1859 - 1917
1917 - 2017

UNESCO konsilis al siaj ŝtatoj-membroj en la jaro 2017 honori la centan jubileon de ducento da meritplenaj personoj. Inter la elektitaj personoj al kiuj la ŝtatoj omaĝu, troviĝas ankaŭ **Lazaro Ludoviko Zamenhof**: la 14an de aprilo 2017 okazos la centa jubileo de lia morto.

Varsovio kaj **Bjalistoko** preparas aparte riĉajn programojn por la jubilea aprilo 2017. Grupeto da kroataj esperantistoj planas partopreni en ili.


Kiel ni en **Kroatio** omaĝos al **Zamenhof** kaj lia jubilea jaro?

Kroacia komisiono pri UNESCO ĉe Ministerio pri kulturo akceptis aŭspicii niajn kulturajn eventojn honore al Zamenhof en 2017.

Estus tre bele se ni povus iam denove okazigi Esperanto-feston en la koncertejo Lisinski, kian ni havis en 2008, okaze de la centa jubileo de la organizita Esperanto-movado en Kroatio. Sed kie havigi rimedojn por pagi tiun ejon? La programon planas **Judita Rey Hudeček**. Niaj petoj estas ĉe diversaj urbaj instancoj. Ni havos respondon pri nia financa farto en la komencaj monatoj de 2017, sed ne multe pli frue ol en aprilo.

Kaja Farzsky planas okazigi specialan apartan koncerton honore al Zamenhof en la zagreba Zamenhof-strato kaj muziki kun sia kolego-muzikisto **Nenad Sinkhauz**.

Kiam vi laste vizitis **Zamenhof-Straton** en **Zagreb**? Vizitu almenaŭ: www.esperanto.hr/bildoj_zeo.htm.



Estus bele promeni al **Zamenhof-Strato** en aprilo 2017.

Se vi jam alvenus la **Zamenhof-strato**, ĉu ne estus bone okazigi ankaŭ literaturan programon kaj inviti plurajn alilandanojn loĝantaj en Zagreb legi iun fragmenton el la libro *Zamenhof-Strato* en sia propra lingvo?

Esperanto-Societo Trixini el **Hraščina** rapidis renkonte al la jaro 2017 publikigi libron de tradukoj/adaptoj el la originala esperanta literaturo de **Spomenka Štimec**, por iom diskonigi Esperanton kaj ĝian fenomenon en **Kroatio**. La societo trovis partneron en literatura societo en Zagorje, Hrvatsko-zagorsko književno društvo, kiu financis la eldonon de la libro *Dom u Srednjoj Europi*. La libro aperis sub la signo de la kroata komisiono pri UNESCO.

Kion vi persone faros en la jubilea jaro por honori la centan datrevenon de la morto de **Zamenhof**?

S. Štimec

Premio Infanlibro de la jaro 2015 al Kroatio denove!

Dum la Belartaj Konkursoj en Universala Kongreso de Esperanto en Nitro estis proklamitaj diversbranĉaj premioj. La premio por la Infanlibro de la jaro estis atribuita al la kroata libro *La trajno en la neĝo* de **Mato Lovrak**. La libron esperantigis **Josip Pleadin** kaj ĝi estas eldonita en **Bjelovar** en 2015. La titolpaĝon ilustris **Renata Đuričić** lernantino de la 3a klaso el Elementa lernejo *Mato Lovrak* el **Veliki Grdevac**. La libro havas du eldonistojn Bjelovara Esperantista Societo kaj Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj.



Depost la jaro 1999 kiam la premion gajnis *Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić* de **Ivana Brlić-Mazuranić** pro la traduko de **Maja Tišljar**, al **Kroatio** venis jam kvar infanpremioj por la infana literaturo: *Rakontoj sub la lito* de **Antoaneta Klobučar**, en traduko de **Davor Klobučar** estis premiitaj en 2005 kaj *Padma, la eta dancistino* de **Tibor Sekelj**, en traduko de **Josip Pleadin** en 2014.

Koran gratulon al la eldonistoj, tradukintoj kaj desegnitantoj!

S.Š.

Nitra

La pinta evento en la 101a Universala Kongreso de Esperanto en **Nitra** estis la konferenco "Perspektivoj de la komunikado en EU" okazinta de la 28a ĝis la 29a de julio 2016 en Univerzita Konŝtantina Filozofa. Kunorganizis la Universitato, Slovaka Esperanta Federacio SKEF, Visegrad Fund, Ministerio de eksterlandaj aferoj de Slovakio, SK-EU2016 kaj EEU. La plej altranga honora gasto de la konferenco d-ro **Vytenis Andriukaitis** adresis sian paroladon al la partoprenintoj en sia posteno de la estro de la EU por la sano en eleganta Esperanto. Junaĝe li aktivis en la litova Esperanto-Movado. Estis plezuro aŭdi liajn opiniojn pri Esperanto. Pli altrangan fakulon-esperantiston ni ne havas. **Zlatko Tišljar** fotis lin kun la specifa kroata donaco.



Festo de meteorito la 20n fojon en Hraščina

La dudekan fojon okazis en **Hraščina** la programo nomata *Renkontiĝo de meteorito*. En la programo sub aŭspicio de la estro de la departemento Željko Kolar ĉefprelegis profesoro de Filozofia fakultato **Dragan Damjanović** prezentante sian plej novan monografion pri la familio **Adrowski-Unukić**, parencoj de la episkopo **Josip Juraj Strossmayer**, kiu posedis la kastelon en **Peščeno** kaj la bienojn en **Hraščina**. Muzikan programon plenumis operkantisto **Ivica Kontent**. Legis la tekstojn aktorino **Tajna Peršić**.

La familio **Adrowski-Unukić** ricevis en 2016 monografion **Vilao Živković-Adrowski-Unukić** lige al la renovigo de ilia ĉefrezidejo en la zagreba **Jurjevka** strato, kiun arte renovigis la novaj posedantoj, la familio **Bračun**. La aŭtoro de la monografio estas D-ro **Dragan Damjanović**. La salutojn de la aŭspicianto nome de la Departemento al la aranĝo transdonis **Ivan Lamot**.

S.Š.



Kurija. Fotis Damir Vnućec

Somere: Rivero KUPA

La 8a boatado sur la rivero Kupa

La nelacigebla **Srećko Radulović** organizis la 8an boatadon sur la rivero Kupa de la 31a de julio ĝis la 5a de aŭgusto, en kiu partoprenis 10 homoj (el kiuj tri infanoj) en tri lignaj tradiciaj boatoj nomataj *šiklje*.

En la boatado ĉi-jare partoprenis ankaŭ junaj esperantistinoj el **Usono** **Maria Angelica Previte** kaj **Briahna Mosteller**. Enkonduke al la aranĝo la junulinoj estis gastigitaj en Zagrebo de **Đivo Pulitika**, prezidanto de Kroata Esperanta Junulara Asocio.

Survoje, post **Karlovac**, la teamanoj ĵetis en la riveron enboteligitan pacmesaĝon en Esperanto.

En la komunumo **Pokupsko** ĉiuj boatanaj ĝuis akcepton de komunumestro de Pokupsko **Božidar Škrinjarić**.

Okaze de la forlaso de **Petrinja**, la estro de la urbeto **Petrinja** vizitis la gastojn de la boata karavano.

Ĉe la fino de la aranĝo en **Sisak**, en la banloko **Zibel**, la du esperantistinoj el **Usono** havis la okazon per mikrofono adresi salutojn al kvincento da kolektiĝintaj festintoj dum **Srećko Radulović** interpretis kaj informis pri Esperanto kaj boatado.

Srećko Radulović / S. Štimec

Aŭtune: POZNAN

Poznano/Poznań – la urbo de miaj studoj

Lastan fojon mi vojaĝis al **Poznano** (Poznań) ĉi-jare en septembro por partopreni la 5-an sesion de Interlingvistikaj studoj en la Universitato Adam Mickiewicz. Mi jam skribis en Tempo pri la studoj mem. Ĉi tie nur mallongripete - la studoj estas gvidataj de **prof. Iлона Koutny** ekde la jaro 1998 kun tre serioza internacia teamo de gastigantaj prelegantoj. Nia grupo estas la sesa generacio de postdiplomaj Interlingvistikaj studoj komenciĝinta en septembro 2014.

Kvankam la studaj sesioj, kiuj okazas dufoje jare, septembre kaj februare, daŭras tre mallonge por kombini abundan programon el prelegoj, ekzamenoj kaj studaj laboraĵoj kun detala ekono de urbo **Poznano**, tamen oni povas trovi iom da tempo por simple ĝui la urbon. Mi volas konfesi - jes, mi vere ĝuas la urban etoson de **Poznano**. Oni povas kompari ĝin kun **Zagrebo** - laŭ loĝantaro **Poznano** estas iom malpli granda ol **Zagrebo**. Ĝi havas ĉirkaŭ 600 000 loĝantojn, kompare kun zagrebaj 800 000. Same kiel **Zagrebo**, la pli vasta urbo-teritorio estas iom pli granda ol miliona loĝantaro. Sur la stratoj de **Poznano** oni sentas iom da komuna historio de germanoj kaj poloj, same kiel en **Zagrebo** oni sentas la komunan historion kun Aŭstro-hungara imperio. **Poznano** estas la ĉefurbo de Vojevodio (Provinco **Grandpola**), ĉirkaŭ 200 kilometrojn for de **Berlino**. La stratoj en **Poznano** estas vastaj. Ĉie, krom en la malnova kerno de la urbo, kiu devenas el la 13-a jarcento oni renkontas tre modernajn avenuojn kun sufiĉe vigla trafiko. Kompare kun **Zagrebo** kiu havas sian monton, **Poznano** troviĝas en ebenaĵo de la rivero **Varto** (Warta) sen iu proksima altaĵo kiu kaŝus la rigardon al iu ajn direkto. Tion lastan, la ebenan situon de **Poznano**, mi vere bone spertis lastan septembron dum brilaj fruaŭtunaj matenoj, vekigante en la 10-a etaĝo de la studenta domo Jowita. Jes, oni vere povis "ĵeti la rigardon" dekojn da kilometroj en ĉiuj direktoj, sen renkonti iun ajn naturan baron - nur fojaj maloftaj same altaj

konstruaĵoj.

Kompare kun zagreba, aŭstro-hungara submonteco, **Poznano** donis al mi kiel al sia (nuntempe regula) gasto iom da nova, antaŭe nespertebla perspektivo pri tio kiel funkcias urbo kaj ties vivo. Vasteco, vasteco, vasteco... tio vere kaptas ĉiujn sentojn en la poznanaj stratoj. Vasta, senbara ĉirkaŭaĵo, vastaj avenuoj, kaj tre vaste malfermitaj loĝantoj pretaj respondi al fremdulo demandanta en iu el "internaciaj helplingvoj" - kie oni povas manĝi - kebabon.

Dum la lasta, septembra studa sesio, ĝuste tra Aleja Niepodległości (Avenuo de sendependeco), en kiu situas la Filologia fakto de UAM, kie ni studas pri interlingvistiko estis organizita "parado de fiero". Ruĝa duetaĝa aŭtobuso kun laŭtparoliloj, multego da diverskoloraj balonoj kaj flagoj, kun amaso da feliĉaj homoj, eĉ tutaj familioj kaj diversaj generacioj, trapasis la avenuon kun sufiĉe videbla "protekto" de polico. Samtempe, en ŝtuparo de iu apuda konstruaĵo estis grupeto (30-50) da kontraŭparadantoj, ĉirkaŭ kiuj estis duvica polica koridoro. Uzante laŭtparolilojn ili laŭkriis sloganojn kontraŭ la parado. En la momento kiam la ruĝa aŭtobuso alfrontis la kontraŭan grupeton, el la mikrofono de la "gvidanto" de la parado oni aŭdis - dziękuję, dziękuję, dziękuję...! (mi dankas, mi dankas, mi dankas...!), kion akceptis kelkaj centoj de paradantoj, kaj tuj la tuta vastega Aleja Niepodległości ripetadis - dziękuję, dziękuję, dziękuję... kaj simple trapasis la grupeton.

Jes, denove mi volas ripeti, min kaptis la vasteco kiun oni sentas sur stratoj de tiu pola urbo. Kara leganto, vi certe ne eraros se vi decidis viziti **Poznanon**. Ne grave ĉu vi iras studi pri interlingvistiko, aŭ vi simple volas senti kiel spiras tiu urbo. Eĉ se la urbo donos al vi alian impreson ol estas tiu per kiu ĝi tuŝis min, permesu al **Poznano** kaj al ties loĝantoj esti via gastiganto almenaŭ dum unu tago - kaj vi, kaj la urbo meritas tiun ŝancon.

Dalibor Šeatović

Kutime diplomatoj kaj politikistoj ne parolas Esperanton, nek esperantumas en niaj aranĝoj. Kaj, se eventuale invititaj, ili post mallonga saluto rapide foriras „pro aliaj gravaj devoj“.

Mi aŭdis pri la aŭstralia ambasadoro **Ralph Harry** kaj lia kontribuo al Esperanto-movado. Laŭdire li, vestita per mallonga pantalone ĝuis rostitajn karpojn en arbaro dum ekskursita tago de la zagreba kongreso 2001. Krome, **Ulrich Brandenburg**, denaska esperantisto, estis ambasadoro de **Germanio** en **Moskvo** kaj **Lisabono**. Aŭdinte tion, mi ekserĉis interrete kaj trovis, ke litova esperantisto **Romualdas Kalonaitis** estis en 1990-aj jaroj ambasadoro de sia lando en **Svedio** kaj en **Eŭropa Unio**. Kaj en la Vikia paĝo sub la nocio Esperantistaj diplomatoj vi trovos pliajn ekzemplojn, el kiuj min agrable surprizis la fakto ke **Abdel Fattah Ezzeldin** estis egipta ambasadoro en **Kubo**.

Sed la unuan ambasadoron-esperantiston mi persone renkontis nur en septembro 2016, en **Hraščina** ĉe Renkontiĝo de esperantaj verkistoj kaj tradukistoj. Nomo, de **Spomenka Stimec** mi ricevis la taskon prezenti la gaston, **s-ron Nanovszky György** el **Hungario (Budapeŝto)**. Kaj, kiel kutime en Esperantujo, se vi prenas unu taskon, baldaŭ al ĝi algluiĝas pluraj novaj. En mia kazo: verki ĉi artikolon por Tempo!

Esperantistoj ne facile prononcos lian hungaran nomon ([ĝörĝ]), kaj la familia nomo ([nanovski]), iomete pol-devena, povus konfuzigi eĉ hungarojn pro tiu nekutima litero „f“, kaj polojn pro „sz“ kiu pole legiĝas kiel „ŝ“. Tial mi skribos esperante **Georgo** (aŭ foje s-ro **Nanovszky**).

Kroata Esperanto-Ligo invitis lin okaze de lia libro kiu publikiĝis en la pasinta jaro 2015. La libro mallonge nomiĝas „Nano“, kio neniam rilatas al fizika aspekto de nia gasto, sed estas mallongigo de lia familia nomo.

Kial tia titolo? Ĉar la libro estas biografio, aŭ eble pli precize aŭtobiografio. Kaj la plena nomo estas „Nano – aventuroj de poliglota diplomato en kvin kontinentoj“.

En libroprezentadoj, oni kutime prezentas du temojn: la libron mem, kaj la aŭtoron. Ĉi tie mi povus paroli ĉefe pri la aŭtoro, ĉar ankaŭ la libro estas pri li.

Li naskiĝis en 1942 en **Budapeŝto**, finis tie gimnazian lernadon kaj komencis universitatan studadon, sed baldaŭ transiris al **Moskvo** kaj tie diplomiĝis pri slavaj lingvoj en 1967.

Iu povus demandi: ĉu vere la vivo de s-ro **Nanovszky** estas tiom interesa? Jes, kaj vi certe konsentos, tuj post kiam vi vidos kian elstaran gaston ni havis. Li estis (sed ne nur!):

- ambasadoro de **Hungario** en **Rusio** (1992-1998) + samtempe en **Armenio**, **Azerio**, **Kartvelio**, **Turkmenio** kaj **Uzbekio**
- ambasadoro de **Hungario** en **Singapuro** (2002-2005)
- unu el ĉefoj de UNCTAD en **Genevo** (UN-organizo por tutmonda komerco, 1982-1986)
- ĉefkonsilanto de urbestro de **Budapeŝto**
- aŭtoro de 15 libroj (ĉefe el la fakoj: diplomatio, historio, lingvoj, religioj)
- (kun)fondinto de la movado Finn-ugra Mondkongreso
- preleganto en pluraj universitatoj.

Kiam nia gasto volas difini sin en du vortoj, li ofte nomas sin „poliglota diplomato“. Poliglota – ĉar li bone parolas ruse, pole, angle, france, indonezie kaj esperante. Sed evidentiĝis, el la libro kaj el lia interparolo kun kroataj esperantistoj, ke li estas konanto de pliaj lingvoj: germana, itala... kaj studinte slavistikon, li konatiĝis iugrade eĉ kun la lingvo kaj literaturo kroata (ekz. kun „Dundo Maroje“!).

Sian brilan karieron li faris grandparte ĝuste pro tio, ke li regis multajn lingvojn! Li devenis el burĝa intelektuala familio, kio aŭtomate estis malrekomendo en la tiama socialisma ŝtato. Sed tiutempe **Hungario** ne havis sufiĉan kvanton da lingvaj fakuloj, kaj kun helpo de iuj komprenemaj

homoj lia kariero iom post iom progresis.

Li vizitis 120 landojn kaj parolis, eĉ amikis, kun pluraj gravaj politikistoj kaj ekleziaj estroj, kaj aliaj gravuloj ĉiuspecaj. Kiel li diris en la libro, devoj de diplomato daŭras 24 horojn tage. Malgraŭ ĉio, li kontribuis ankaŭ al la esperanta movado kiel:

- prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, kaj nun ĝia honora prezidanto
- honora membro de UEA ekde 2012
- ordinara membro kaj profesoro de AIS, estrarano de literatura PEN-centro
- dum sia restado en **Rusio** (studento + ambasadoro) helpadis tiean esp-movadon
- partoprenanto en pluraj UK-oj
- kunorganizanto de fervojista IFEF-kongreso 1962 en **Budapeŝto**
- prezidanto de la Esperanto-Klubo Studenta en **Budapeŝto**.

La libro estas en formo de intervjuoj, pri lia vivo kaj kariero. Sed ne nur! Oni povas multon legi ankaŭ pri la mondo en kiu ni vivis kaj vivas.

Intervjuis lin alia esperantisto, hungara kaj esperanta verkisto **István Nemere**. Iuj kroataj esperantistoj rememoras, ke **Nemere** estis gasto en **Kroatio**, en la vilaĝo **Hraščina** antaŭ 11 jaroj. Do, **Nemere** parolis kun nia gasto, surpaperigis la interparolojn kaj tria persono, **Jozefo Horvath**, tradukis al Esperanto.

Nemere organizis la tekston en la komenco pli-malpli kronologie. Unue vi povas legi pri la infanaĝo de s-ro **Nanovszky**, poste pri la gimnaziaj jaroj, pri la fatala jaro 1956 (por hungaroj), pri lia provo fariĝi studento en malfavora epoko, pri lia intertempa ĉiĉerona laboro kun eksterlandaj turistoj en **Hungario**, pri la studado...

Li estis junulo pasie amanta lingvojn, kiu havis vivo-revon fariĝi diplomato, sed la ŝtato malfavoris lin pro lia deveno kaj pro lia emo pensi per la propra kapo. Tial li poste vane serĉis laboron en Ministerio de eksterlandaj aferoj, la pordoj por li estis fermitaj. Tamen troviĝis homo kiu rekonis liajn talentojn kaj kiu ne zorgis pri la politika premo. Kaj **Georgo** eklaboris en la hungara komerca ministerio, poste eĉ en UNCTAD kiel reprezentanto de **Hungario**. Post ĉeso de la komunista reĝimo realiĝis lia revo – li fariĝis diplomato.

En la dua parto de la libro, oni resumas lian vivon laŭ temoj: lingvoj, virinoj, finn-ugra movado, karaktero de hungaroj, liaj laborlokoj kaj lia emeritula agado.

La libro pensigis min pri la polo **Roman Dobrzyński** kaj lia libro *Zamenhof-strato*. Simile li, verkisto, intervjuis alian esperantiston kun interesa vivhistorio – ĝuste la nepon de **Zamenhof**, s-ron **Louis Zaleski-Zamenhof**. Estas tie tri partoj: pri lia vivo en la varsovia geto, pri la esperanta movado, kaj trie pri la propra faka kariero de la nepo (betona arkitekturo). Sed en la *Aventuroj de poliglota diplomato* estas malpli pri Esperanto (tamen sufiĉe), kaj la kariero de **Nanovszky** estas por ni esperantistoj multe pli ekscita.



Fotis Antoaneta Klobučar

Mi menciuj kelkajn epizodojn el la libro kiuj min impresis:

Georgo kiel gimnaziano nur „umis“ tra budapeŝta esperanta klubo unu jaron, ĉefe pro iuj knabinoj, ĝis li finfine decidis ellerni Esperanton. (Inter liaj instruantoj estis ankaŭ la famega esperanta verkisto **Julio Baghy**). Sed jam kiel 16-jarulo li fariĝis prezidanto en studenta esperanta klubo!

Li atestis pri la soveta armea interveno en 1956, kiu en budapeŝtaj stratoj aspektis kiel vera milito. Ankaŭ lia hejmo estis bombe detruita.

Hungaroj ĝenerale malŝatis la rusan lingvon, sed **Georgo** ĝin ege ekŝatis. La paradokso klariĝas per tio, ke iu instruisto diris al li, ke lingvo estas nur interesa kaj utila ilo, neniel respondeca pri tio kion faras ĝiaj parolantoj.

La komunista reĝimo ĉiumaniere favoris infanojn el laboristaj familioj kaj malhelpis tiujn el intelektula medio. Tial, laŭ regulo kiu nun ne estas imagebla, post enskribiĝo en la budapeŝtan universitaton li devis unue du jarojn labori, kaj nur poste li rajtis efektive ekstudii! Dum tiuj jaroj li estis t.n. prestudento.

Kiel ambasadoro en **Moskvo** li respondecis ankaŭ pri Armenio kaj foje restadis ankaŭ tie. Sed en malriĉa lando oni kutimis dumnokte elŝalti elektron al la loĝantaro, pro certa ŝparado. Ankaŭ liftoj en lia hotelo en **Erevano** post la 8-a horo vespere restis sen elektro. Post malfrua vespera promeno li, ambasadoro, devis foje piedgrimpi al sia 10-a etaĝo!

Fariĝinte finfine en 1992 ambasadoro de **Hungario** en **Rusio**, li tuj provis realigi kelkajn grandajn projektojn. Unu el ili estis organizi viziton de rusia prezidanto **Boris Jelcin** al **Hungario**. La afero, per si mem neniel facila, iĝis eĉ multe pli komplika pro ofta „malsano“ de **Jelcin** (kies kaŭzo cetere havis tre simplan kemian formulon). Tamen la afero sukcesis, **Jelcin** ne nur vizitis **Hungarion**, sed ankaŭ parolis en hungaria parlamento kaj petis pardonon pro malbonajfoj kiujn **Sovetio** faris al **Hungario**.

Georgo multe klopodis, ke **Rusio** redonu al **Hungario** artajn kaj historie valoregajn objektojn kiujn soveta armeo en 1944-1945 forportis (por diplomatece eviti la esprimon „oficiale forŝtelis“). Sed la valorajfoj ne revenis tiom rapide, kiom rapide ili antaŭe forlasis la landon. Fakte, granda plimulto da ili tute ne revenis.

Lia plej granda ideo estis organizi renkonton de la katolika papo kun rusa ortodoksa patriarko ie en **Hungario**. La taŭga loko troviĝis, la dato ankaŭ, kaj la religiestroj kaj la publiko simpatiis pri la ideo, sed post multega organiza laboro malpermesis la renkonton la ortodoksa sinodo (granda konsilio de ortodoksa religio), kiun la patriarko, mem ne havanta absolutan potencon, devis obei.

Interese estis legi pri la tri edzinoj de **Georgo**. La unuaj du ne povis sekvi lin en lia tre dinamika vivo. Kaj la tria, **Maria**, restis kun li kaj akompanis lin al nia renkontiĝo en **Hraŝcina**! Ankaŭ pri aliaj amoj li rakontis en la libro. En unu momento mi haltis kaj demandis min: tiom da virinoj – kaj kie estas la infanoj? Ĉu mi pro malatento preterlegis mencion de infanoj? Sed ne, tion la redaktoro lasis por fino. Kun unu rusino **Georgo** havis filon, sed ŝi havis edzon tiutempe. Ankaŭ certaj severaj reguloj en **Sovetio** komplikigis la aferon. Ili konkludis, ke plej oportune estas lasi la infanon kreski en ŝia familio, dirante nenion al la edzo, nek al la filo. Nur post 50-jaroj okazis renkonto inter la filo kaj la vera patro, kie **Georgo** konfesis al li la veron. Ŝajnas al mi, ke la filo akceptis la fakton sufiĉe kompreneble.

Per ĉi ekzemploj mi volis iom proksimigi la libron al la esperantistaro. Mi mem legis ĝin kun granda ĝuo, ofte eĉ sen spiro. Unu eventoriĉa vivo malkovriĝis antaŭ mi, kaj en ĝi speguliĝis ankaŭ la eŭropa kaj monda historio de la 20-a jarcento. Sekretoj de diplomata / ambasadora vivo, anekdotoj de turisma gvidanto, strebo al realigo de junaĝaj

revoj, bonaj kaj malbonaj homoj, revolucioj, militoj... kaj iomete pri la esperanta movado. Multon vi trovos en ĉi tiu libro. Ĝi meritas esti tradukita al aliaj lingvoj. Kaj efektive ĝi jam tradukiĝis el la hungara originalo al Esperanto kaj al la lingvoj angla, germana kaj rusa. Mi profetas, ke ĝi altiros atenton de vasta neesperanta publiko, kaj per tio iom profitos ankaŭ nia kara verda lingvo.

Davor Klobuĉar

La 14a Renkontiĝo de verkistoj

En la bieno de **Spomenka Ŝtimec** en **Kroatio**, en la vilaĝo **Hraŝcina** okazis la **14a Renkontiĝo de esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj** la 17an kaj 18an de septembro. Kvardeko da legantoj venis renkonti verkistojn kaj informiĝi pri novaj libroj. Post la subita morto de **Paul Gubbins** en aŭgusto, (**Gubbins** intencis prezenti al ni ĉi-jare sian anglalingvan antologion de la esperanta literaturo *Star in the night sky*) – okazis la programero *Omaĝo al Paul Gubbins*. Sian esperantan biografion *Nanon* el la nekutima kariero de diplomato prezentis Dr-o **György Nanovszky** el **Hungario**. La libro aperis ankaŭ en la angla, hungara kaj rusa.

Konata kroata publicisto **Slavko Goldstein** parolis pri sia patro-esperantisto, pereinta en 1941, al kiu **Goldstein** dediĉis ĉapitron en sia kroatlingva libro *La jaro 1941, la jaro kiu revenas*.

Olga Ŝtajdohar-Paden prezentis libron kiun ŝi kompilis el 62 kontribuoj de virinoj kiuj rakontas pri kio ili fieras en sia vivo. Inter kontribuantoj al la libro *Pri tio mi vere fieras* troviĝis kvin esperantistinoj.

Božidar Brezinščak Bagola enkondukis novan, kroatlingvan, libron de **Spomenka Ŝtimec** kiu havas la titolon *Dom u Srednjoj Europi*. Ĝi enhavas fragmentojn el ŝiaj verkoj *Tena – hejmo en Mezeŭropo*, *Tilla* kaj *Kroata milita noklibro* en ŝia gepatra lingvo, inkluzive vojaĝprozon el **Irano**, **Svedio**, **Ĉeĥio**, **Litovio**, **Malajzio** kaj **Bosnio kaj Hercegovino**.

Per la koncerto de muziko el la juda kulturo **Neven Mrzlečki** anoncis la jaron 2017 en kiu esperantistoj omaĝos al la centa jubileo de la morto de **Lazaro Ludoviko Zamenhof**.

La aranĝon finance helpis Ministerio pri kulturo de Respubliko Kroatio kaj Akademio Literatura de Esperanto.

S.Š.

Fotis Davor Klobuĉar





Fotis Zlatko Tišljar

La kvaran jaron sinsekve **Bjelovara esperantista societo** organizis programon titolita *Bjelovaraj esperantistoj al sia urbo*. Ĉi jare la aranĝo okazis de la 21a ĝis la 23a oktobro dum en antaŭaj jaroj la programoj okazis en septembro. Miaopinie la oktobra dato estas pli konvena por allogo de la publiko.

La programo ĉi jare estis vere riĉa kaj ĉiu povis ĝui almenaŭ parton, se ne ĉion. Vendredon estis malfermitaj ekspozicioj en la Urba biblioteko *Petar Preradović*. **Zeljko Saks** preparis filatelan ekspozicion *Esperanto sur poŝtmarkoj* kaj **Berislav Rubčić** foto-ekspozicion *Floraj motivoj*. La ekspozicioj restos malfermitaj ĝis la 5-a de novembro 2016. Sabate oni organizis etnografian ekskurson al **Maglenča** kaj **Veliko Trojstvo**.

Dimanĉon okazis la centra parto de la tuta programo kaj ĝi estis plej multnombro vizitata. Esperantistoj el kvin landoj vizitis la Bjelovaran solenaĵon kiun oni plejparte dediĉis al **Tibor Sekelj**, la mondvojaĝanto kaj vojaĝkronikisto, muzeologo, elstara reprezentanto de la Esperanto-movado. Unue ni vizitis la ekspozicion **Manpleno da mondo** kiu prezentis objektojn, kiujn **Tibor Sekelj** kolektis en **Aŭstralio** kaj **Papuo-Nov-Gvineo** dum sia vojaĝo en la 1970-aj jaroj. La ekspozicion kune starigis la muzeaj fakuloj **Attila Pejčin** (**Senta**) kaj **Tomislav Matić** (**Bjelovar**), kiuj informis la vizitantojn pri la eksponaĵoj. Gravus diri ke por la unua fojo ekster la domicila Urba muzeo en **Senta** prezentiĝas objektoj el kolekto de **Tibor Sekelj**. La ekspozicion oficiale malfermis la Bjelovara urbestro **Antun Korušec** per inspira parolado pri **Bjelovar** kaj la kunlaboro kun bjelovaraj esperantistoj.

Sekvis la prelegoj dediĉitaj al **Tibor Sekelj**: **Zlatoje Martinov** (**Serbio**) parolis pri la temo *La poezio de Tibor Sekelj*; **Đorđe Dragojlović** (**Serbio**): *Nia (ne)konata korifeo*; ĵurnalistino **Yu Jianchao** el **Ĉinio** *Tibor Sekelj en Ĉinio* kaj fine en la kroata parolis **Juraj Bubalo** (**Kroatio**) pri la temo: *Tibor Sekelj, la multflanka vojaĝanto* (okaze de la publikigo de *La papua taglibro*, la esperanta eldono de la libro, kiun esperantigis **Josip Pleadin**. **Zdravko Seleš** kaj **Josip Pleadin** prezentis la libron. La fragmentojn legis **Mihaela Cik** el zagreba Studenta Esperanto Klubo. Post tio sekvis la deklamkonkurso kiun gvidis **Zdravko Seleš** kaj ĝin partoprenis krom infanoj kaj gejunuloj ankaŭ plenkreskuloj el Kroatio kaj eksterlando.

Ĉio ĉi okazadis en la Urba muzeo de **Bjelovar** kiun ni forlasis posttagmeze por amikumi en la *Restoracio Golub* kie estis preparita komuna tagmanĝo. Dume oni proklamis kaj premiis la venkintojn de la deklamkonkurso kaj **Josip Pleadin** aparte prezentis la poemkolekton *Miniaturaj de Milica Ježovita el Križevci*. Ĉiuokaze tio estis agrabla renkontiĝo de esperantistoj el kvin landoj **Kroatio, Slovenio, Serbio, Hungario** kaj **Ĉinio**.

Anto Mlinar

Premiitoj de la 4a deklamkonkurso en Bjelovar

Kategorio: lernantoj de elementa lernejo

1. Ivana Pleskina (Rijeka)
2. Nikolina Keglević (Zagrebo)
3. Josip Vešnik (Zagrebo)

Kategorio: mezlernejoj kaj studentoj

1. Ivana Kolarić (Đurđevac)
2. Marija Vešnik (Zagrebo)
3. Ana Ređep (Đurđevac)

Kategorio: plenkreskuloj

1. Marija Jerković (Zagrebo)
2. Aranka Laszlo (Subotica, Serbio)
3. Anton Mihelič (Brežice, Slovenio)

La plej bona deklamanto de la aranĝo:

Marija Jerković (Zagrebo)

Grozdana Grubišić-Popović

Brazilaj impresoj

Nur kiam estas +19 °C virinoj piedvestas botojn...

Mi vere ŝatas someron kaj ĉiun septembron en mi naskiĝas iu malbenita maltrankvilo. Ĉi-jare mi decidis silentigi tiun ploremulon en mi per perfekta solvaĵo (perfekta, sed, bedaŭrinde, multekosta) – per vojaĝo al **Rio de Janejro**. Kompreneble ke motivo por la vojaĝo ne estis tiel banala ĉar mi vojaĝis en **Rio** por volontuli en Paraolimpikaj ludoj kaj perfektigi pri la portugala lingvo. Turistino en mi neniam forgesos vidindaĵojn kiel la monto Sukerpano, statuo de Kristo la Savanto, la ŝtupoj de Selarón aŭ Kopakabano kaj esperantistino en mi ne forgesos la viziton al Avenida Treze de Maio, adreso de Kultura Kooperativo de Esperantistoj (KKE) kiu ofte organizas eventojn. Mia kara amiko **Márcio Santos Nascimento**, estrarano de La Asocio Esperantista de **Rio de Janejro** (AERJ), invitis min al unu el iliaj eventoj. La programo estis riĉa – iomete da muziko,



Fotis Andrea Horvat

REF (Renkontiĝo de esperantaj familioj)

Ĉi somere, post 6 jaroj, Renkontiĝo de esperantaj familioj (REF) denove estis gastigita en **Kroatio**. En la jaro 2010 familio **Radovanović/Filipčić** organizis ĝin en kastelo **Stara Sušica** en **Gorski Kotar** kaj tiu REF longe restis en la memoroj de partoprenantoj pro interesa ejo, bela naturo kaj bona etoso. Ĉi-jare la sama organizanta familio elektis la novan ejon, Fužinarska kuća en vilaĝo **Fužine**, kiu ankaŭ same bone zorgis pri siaj gastoj. Kvankam la organizantoj (privata entrepreno) jam dum pluraj jaroj gastigas tute diversajn grupojn, ekde religiaj kunvenoj ĝis handikapitaj infanoj kaj junaj sciencistoj, ili diris ke tiel gajan kaj bonkoran grupon kiel REF-anaro ĝis nun ili neniam havis kaj ili eĉ lernis iom da Esperanto por la ĉiutagaj bezonoj dum la aranĝo.

La aranĝon partoprenis entute 71 partoprenantoj (35 gepatroj kaj 36 infanoj) el 20 familioj el 12 landoj. Estis bele vidi plurajn novajn familiojn inter la jam konataj amikoj, abundis malgrandaj infanoj kaj, kiel surprizo, ĉi-jare la plej multnombraj estis francoj kaj danoj!

Dum dekonu tago de julio la partoprenantoj plej multe da tempo uzis por babili kaj ludi tutdiversajn ludojn, sed ankaŭ tre ŝatataj estis manlaboraj laborgrupoj (ĉiutage estis almenaŭ du diversaj) kaj du tute novaj (kaj tute malsamaj!) aldonoj al kutima REF-a programo: diskuttrondoj pri diversaj familiaj kaj sociaj vivflankoj (plej vizititaj estis pri urba ĝardenumado kaj ekranumado inter infanoj kaj gepatroj) kaj zumba danckurso. Unu tuttaga ekskurso gvidis la partoprenantojn al plaĝo **Soline** sur insulo **Krk** (kie eblis ne nur naĝi en la maro, sed ankaŭ ŝlimumi marborde) kaj du pli mallongaj al groto **Vrelo** kaj ludparko **Vrata** kies plej interesa aktivado estis dratŝnurlifto («zipline») super arbara valetto. Kompreneble, la tradiciaj programoj ne rajtas malaperi kaj oni kun honoro povas raporti ke ĉiumatena kantado estis tre bone vizitata kaj Internacia vespero denove havis longan programliston.

La partoprenantaro estis feliĉa ke la ĉi-jara REF, jam la 38-a, daŭre montras intereson por ĉiutaga uzo de Esperanto en familia vivo inter okcidenteŭropaj familioj kaj ĉi-jare ankaŭ aperis pli da orienteŭropaj familioj ol dum lastaj REFoj. Enketo inter gepatroj montris ke laŭ ilia opinio Esperanto donas al infanoj tre bonan ekirpunkton al vivo en nuna «globala» mondo kie tutmondeco kaj kultura interŝanĝo okazas ĉiutage - ne ĉiam rilate al Esperanto, sed kono de Esperanto pli faciligas la komprenon kaj akcepton de tia mondo.

Venontjara 39-a REF okazos plej verŝajne en **Serbio**, en infanripozejo sur monto **Rudnik** apud **Gornji Milanovac** (ĝustaj tagoj ankoraŭ ne estas fiksataj).

Vanja Radovanović

iomete da aktorado, iomete da humoro, iomete da poezio kaj iomete da lernado pri **Kroatio**. Sed vera konatiĝo sekvis post la oficiala parto de programo, kun abundo de manĝaĵo (vegana) kaj trinkaĵo. Tio okazis jam ĉe la fino de mia restado en **Rio** kaj preskaŭ ĉio memorigis min pri hejmo kaj tiu evento memorigis min ankaŭ pri similaj kiujn organizas KEL. Iomete da interparolo/diskuto pri kulturo, iomete pri politiko kaj multe pri fremdaj ligvoj... Sed, ĉio havas finon kaj post kelkaj belegaj horoj kun esperantistoj, mi marŝis en unu pli "malvarman" vintran nokton en **Rio**, kie botoj eliras de ŝranko nur kiam estas +19°C.

Andrea Horvat

803. Damir Mikuličić	53,33 eŭroj
804. Mladenka Đaković	40,00 eŭroj
805. Đivo Pulitiĉa	53,33 eŭroj
806. Spomenka Štimec	53,33 eŭroj
807. Zlata Nanić	53,33 eŭroj
808. Božidar Brezinščak Bagola	26,66 eŭroj
809. Blanka Pavlović-Devčić	66,66 eŭroj
810. Jelena Lončarević	16,00 eŭroj
811. Teodor Mikić	66,66 eŭroj
812. Željko Gubijan	26,66 eŭroj
813. Faruk Islamović	6,66 eŭroj
814. Marija Kvakić	6,66 eŭroj
815. Nikola Vidić	6,66 eŭroj
816. Roža Brletić Višnjić	6,66 eŭroj
817. Nikola Vuković	6,66 eŭroj
818. Nataša Dorosulić	10,66 eŭroj
819. Anto Mlinar	100,00 eŭroj
820. Anonima	120,00 eŭroj
821. Jadranka Tarle	6,66 eŭroj
822. Milan Sudec	6,66 eŭroj
823. Davor Klobučar	140,00 eŭroj
824. Ljerka Begić	6,66 eŭroj
825. Gordana Katunar	6,66 eŭroj
826. Josipa Katunar	6,66 eŭroj
827. Zlatko Hinšt	6,66 eŭroj
828. Josip Brkanac	6,66 eŭroj
829. Željka Bradić	6,66 eŭroj
830. Rađa Rakić	6,66 eŭroj
831. Adela Franelić	6,66 eŭroj
832. Ruža Perković	6,66 eŭroj
833. Denis Haziri	48,66 eŭroj
834. Božena Perković	6,66 eŭroj
835. Emilija Obradović	6,66 eŭroj
836. Davor Štimec	6,66 eŭroj
837. Dinka Šimunić	6,66 eŭroj
838. Goran Lakotić	6,66 eŭroj
839. Mira Kocjančić	6,66 eŭroj
840. Nenad Margetić	13,32 eŭroj
841. Željka Treer	13,32 eŭroj
842. Tomislav Treer	13,32 eŭroj
843. Bojana Đuričić	6,66 eŭroj
844. Olga Srkoč	6,66 eŭroj
845. Elio Nocent	20,00 eŭroj
846. Damir Matašin	6,66 eŭroj
847. Đurđa Stokić	6,66 eŭroj
848. KEL anstataŭ floroj sur la tomo de Radenko Milošević	53,33 eŭroj
849. KEL anstataŭ floroj sur la tomo de Blanka Pavlović-Devčić	53,33 eŭroj
850. Esperanto Societo Rijeka anstataŭ floroj sur la tomo de Adem Morankić	40,00 eŭroj
Sume:	1.259,06 eŭroj

Inter junio kaj novembro 2016 niaj membroj kolektis por Vodnikova 1.259,06 eŭrojn. Ekde la jaro 2003 ni kolektis inter niaj membroj kaj amikoj 48.396,36 eŭrojn.

Nia lasta kredo al Esperanto-Societo Trixini en novembro 2016 estas 10.849,58 eŭroj, kaj nia monata partopago laŭ la kontrakto estas 181,47 eŭroj.

Dankon al la membroj kiuj helpis al ni havi propran Esperantejon en Zagrebo!

Nia banknumero en Raiffeisenbanko: Hrvatski savez za esperanto IBAN HR6124840081100881157. Modelo 00

La estraro dum la septembra kunveno decidis ankoraŭ ne translokiĝi al Vodnikova. En niaj ejoj daŭre loĝas subluantoj, helpantaj al niaj financoj.

Memorigo:

Kiam ni aĉetis nian ejon en Vodnikova 9 en la jaro 2003, ni pagis por la ejo 108.000 eŭrojn. Ni devis pagi aldone la imposton de 5.000 eŭroj. Sume ni pagis 113.000 eŭrojn.

Kiel ni plibonigis nian ejon en la somero 2016?

Ni farbigis unu plian fenestron en la tagĉambro.

Renkonte al la centa jubileo de la morto de L.L. Zamenhof en 2017 ni memorigas pri la antologioj kiujn kreis kroataj esperantistoj en la zamenhofa lingvo.



1. Kroataj poeziaĵoj

Kun literaturhistoria enkonduko de Mavro Špicer.

Verkoj de Arnold, Badalić, Cirkari, Domjanić, Gaj, Harambašić, Hranilović, Jorgovanić, Katalinić-Jeretov, Kranjčević, Magjer, Mihanović, Milaković, Nikolić, Preradović, Šenoa, Tresić-Pavičić, Trnski, Vraz, Vukelić, Zahar.

Eldonis: Propra eldono de la kompilinto Mavro Špicer.

Tradukis: Mavro Špicer

Presejo: Markovits és Garai, Budapeŝto, 1912; 62 p., 19,1 cm

Prizorgis: Mavro Špicer

2. Moderna kroata prozo

34 noveloj, de la komenco de la 20-a jarcento ĝis 1978

Kompilis: D-ro Ivan Krtalić

Tradukis el la kroata: Roger Imbert

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1979. ; 606 p.

Prizorgis: Zlatko Tišljar

3. Kroatia poezio

(1830 -1980) - 68 aŭtoroj, pluraj tradukintoj

Kompilis: D-ro Ivo Krtalić

Redaktoro: Spomenka Štimec

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1983; 296 p.; 20 cm

Prizorgis: Zlatko Tišljar kaj Spomenka Štimec

4. Kroatia esperanta poemaro

Originala poezio de kroataj esperantistoj de la komenco de la dudeka jarcento ĝis 1991

Redaktoroj: Lucija Borčić, Ivan Špoljarec, Zlatko Tišljar

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1991; 110 p.; 20 cm

Prizorgis: Zlatko Tišljar

5. Poemaro de kroatoj en Hungario Pjesništvo Hrvata u Mađarskoj

Traduko de la poemoj de la kroatoj vivantaj en Hungario.

Eldonis: Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, 1992

136 p.; 19,8 cm

Prizorgis: Marija Belošević



6. Izolulo/Osamljenik

23 kroataj poemoj en traduko al 15 lingvoj

Redaktoro: Spomenka Štimec

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1993;

165 p.; 20,5 cm

Prizorgis: Spomenka Štimec

7. Antologio de kroataj unuaktaj dramoj

Eseo pri la kroataj drama literaturo kaj teatro kaj dek unuaktaj teatraĵoj de dek aŭtoroj

Kompilinto: Branko Hećimović

Redaktoro: Spomenka Štimec

Eldonis: Kroata Esperanto-Ligo, Zagreb, 1997; 210 p.; 24 cm

Prizorgis Spomenka Štimec

ISBN: 953-96918-0-X

Recenzoj: de Boris Kolker *Teatra antologio*; de Grigorij Arosev *Kroataj dramoj*; de Sten Johansson *Riĉa koktelo*

8. En tiu terura momento

Antologio de la nuntempa kroata milita liriko

Kompilintoj: Ivo Sanader kaj Ante Stamać

Redaktoro: Spomenka Štimec

Tradukis: Krešimir Barković kaj 14 tradukintoj

Eldonis: Školska knjiga kaj Kroata Esperanto-Ligo, Zagreb, 1998; 158 p.; 20 cm

Prizorgis: Dalibor Brozović kaj Spomenka Štimec

ISBN 953-96918-1-8

9. Barkoj el akvo

Elektitaj kroataj noveloj 1970 - 1995

Tradukis: Slavica Babinka, Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Klaus Dahmann, Josip Pleadin, Nikola Rašić, Zdravko Seleš, Ivan Špoljarec, Maja Tišljar

Kompilis: Julijana Matanović

Redaktoro: Ivan Špoljarec

Eldonis: Internacia Kultura Servo, Zagreb, 1998; 245 p.; 20 cm

Prizorgis Ivan Špoljarec

ISBN 953-96010-8-8

10. Kroataj poetoj de la 20-a jarcento

Eta antologio kun biografioj de aŭtorinoj

Dudek kroataj aŭtorinoj kun 88 poemoj

Kompilis: Dunja Detoni Dujmić

Redaktoro: Spomenka Štimec

Tradukis: Lucija Borčić, Ivo Borovečki, Danijela Drakula, Zora Heide, Goran Lakotić,

Josip Pleadin, Zdravko Seleš

Eldonis: Kroata Esperanto-Ligo, Zagreb, 2003; 129 p.; 20 cm

Prizorgis Spomenka Štimec

ISBN 953-96918-6-9



11. Pjesništvo gradišćanskih Hrvata Poemaro de burglantaj Kroatoj

Književno stvaralaštvo Hrvata van domovine

Redaktoroj: Marija Belošević kaj Đuro Vidmarović

Tradukis: Lucija Borčić kaj aliaj

Eldonis: Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, 2006

224 p.; 20 cm. Dulingva.

ISBN 953-6118-10-6

Prizorgis Marija Belošević

12. Pjesništvo moliških Hrvata Poezio de molizaj Kroatoj

Književno stvaralaštvo Hrvata van domovine

Redaktis: Marija Belošević kaj Đuro Vidmarović

Tradukis: Lucija Borčić kaj Zora Heide

Eldonis: Kroata Esperantista Unuiĝo, Zagreb, 2007; 102 p.; 20 cm


Prizorgis Marija Belošević

13. Pjesme i proza rumunjskih Hrvata Poezio kaj prozo de la rumanaj Kroatoj

Književno stvaralaštvo Hrvata van domovine

Redaktis: Marija Belošević kaj Đuro Vidmarović

Eldonis: Kroata Esperantista Unuiĝo Zagreb, 2008



RADENKO MILOŠEVIĆ (1943 – 2016)

Naskiĝis en Zagrebo la 23an de julio 1943. Li diplomiĝis pri geofiziko en 1967 kaj pri ekonomio en 1971 en Universitato de Zagrebo. Ekde 1971 li postenis en Instituto pri planado kaj poste en Ekonomia Ĉambro de Zagrebo.



Li fariĝis esperantisto en la societo Naturamikoj en 1962 kaj poste li aktivis en la zagreba Esperanto-Societo *Bude Borjan* kies prezidanto li estis.

Li lanĉis bultenon ZELano kiel organon de Zagreba Esperanto-Ligo.

En la jaro 1991 li kun Marija Belošević fondis paralele al KEL Kroatan Esperanto-Unuiĝon – KEU. Akademiano Dalibor Brozović invitis lin kunigi KEU kun Kroata Esperanto-Ligo por ke Kroatio estu akceptita en UEA kiel membro-ŝtato okaze de la disfalo de Jugoslavio kaj ties Esperanto-Movado. Li kun M. Belošević subskribis la dokumenton pri kunfandiĝo de du asocioj kaj Kroata Esperanto-Ligo estis en Vieno en 1992 akceptita Landa Asocio de Universala Esperanto-Asocio. Ekde 1992 ĝis 2014 li estis vicprezidanto de Kroata Esperanto-Ligo kaj kontribuis al ĝi divesmaniere. Interalie li trovis subvencion por *Tempo* kaj li ĉeforganizis la 5an kongreson de kroataj esperantistoj en Zabok en 2005 kaj financis tre belan katalogon *Esperanto en kulturo kaj politika vivo de Kroatio*. Kunlaboris kun kelkaj internaciaj Esperantogazetoj (*Sennaciulo*, *Kontakto*.) sed li preferis agi loke.

Li estis ĉefmotoro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj kiun li fondis en 2007 kaj la ĉefredaktoro de luksa revuo *Zagreba Esperantisto* al kiu li enhave kaj finance kontribuis plenan jardekon.

Fidela membro de UEA ĝis la vivofino. En aŭgusto 2016 Belartaj Konkursoj de UEA premiis la infanlibron *La trajno en la neĝo* kiun Milošević kunfinancis.

Li estis enterigita en la zagreba tombejo Mirogoj la 26an de aŭgusto 2016.

La kroata Esperanto-Movado perdis sian tre specifan multjaran aktivulon.

S. Štimec

Fotis Davor Klobučar

Kuko "Ventumilo" de Blanka. Fotis Ljubo Pavlović



ADEM MORANKIĆ (1944 – 2016)

En Reutlingen en Germanio forpasis la 7an de septembro Adem Morankić, membro de Esperanto Societo **Rijeka**. Li naskiĝis la 1-an de Januaro 1944 en **Donji Moranjci, Srebrenik, Bosnio kaj Hercegovino**. Li laboris en **Dubrovnik** ĝis 1971 kiel elektro-mekanikisto en kelkaj entreprenoj kaj poste en **Hamburg, Germanio**. Ekde 1984 laboris kiel veterinara teknikisto en Instituto por tropikaj malsanoj. En la jaro 2000 translokiĝis al **Reutlingen** kaj laboris kiel veterinara-teknikisto ĉe Esplora instituto por medicino pri Universitato **Tübingen**. Emeritiĝis en la jaro 2009.

Esperantiĝis en la jaro 1981 en **Hamburg** kaj ekestis membro de Esperanto-Societo **Hamburg**. Estis membro de la hamburga societo ĝis la jaro 1987. Aktivis en la hamburga societo sur sporta kampo. Fondis kaj gvidis piedpilkan klubon sub nomo „Esperanto“ **Hamburg**. La klubo partoprenis oficialajn lokajn konkurojn. Li organizis plurfoje futbalajn turnirojn sub la nomo „Esperanta futbala turniro“. Ekde la 2003 kaj ĝis sia morto li estis membro de Esperanto Societo **Rijeka**.

V. Morankić

BLANKA PAVLOVIĆ – DEVČIĆ (1941 – 2016)

Nia membro **Blanka Pavlović-Devčić** mortis en **Zagrebo** la 12an de oktobro 2016. Ŝi naskiĝis en **Gunja** la 17an de marto 1941, lernis Esperanton de sia patro, poŝtoficisto **Dragutin** en **Slavonska Požega** kaj poste instruis ĝin tie. Per esperantaj rilatoj ŝi trovis postenon en **Svislando**, kie ŝi laboris ĝis la pensiigo kiam ŝi revenis en **Zagrebon**. En **Svislando** ŝi laboris kiel librotenistino en financa oficejo de granda firmao. Ŝi membris en svisaj Esperanto-Societoj. Revene al **Kroatio** ŝi denove malkovris Esperanton kaj konstatis ke okupiĝo pri Esperanto donis al ŝi plezurojn nekompareblajn kun la aliaj. Ĉi-jare la 30an de junio japana tagĵurnalo, regiona tagĵurnalo por Nagoya The Chunici Shimbun publikigis pri ŝia serĉado de la iama korespondanto per Esperanto. La serĉado de la ĵurnalo, al kiu kontribuis esperantistino **Kikušima Kazuko Krizantemo** startis tro malfrue, la sinjoro mortis en 2015. Japana ĵurnalo publikigis ankaŭ la foton de la kuko *Ventumilo* el la kuirlibro de **Blanka**, dediĉita al la japana amiko.

Blanka Pavlović-Devčić decidis heredigi al Kroata Esperanto-Ligo 5000 eŭrojn. Ŝi decidis ke KEL ricevu tiun monon tuj okaze de la decido en 2014 kaj ŝia financa helpo grave kontribuis al malgrandigo de la ŝuldoj por la ejoj en Vodnikova.






Ŝi estas unu el tiuj esperantistoj kiuj kontribuis al la esperanta komunumo ĝis la lasta vivotago.

Ŝia tombo estas en tombejo Sv. **Ilija** en **Požega**.

S.Š.



Fotis Kikušima Kazuko - Krizantemo



Nikolai Hohlov

Vintra fabelo

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo, Kun tintila sonorad' Ni veturas – aventuras, la ĉevaloj fluge kuras Sub la stela myriad'.	Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj Por dancanta ciganin', Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu Per freneza takto nin!
En sereno de l' ebena malaperas la fadeno, De la glita vintra voj'... Mia Nita – am' subita, de la frost ebriigita Alpremiĝas en la ĝoj'.	Brila neĝo – vintra reĝo – ĉiom tenas en sieĝo, Gaje ĉirpas en la knar', La survoja vento ĝoja en malklara gam' hoboja Vokas, logas al kampar'.
En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo De la sentoj de la kor', Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide Kun favoro de Amor'!	Unu suno – unu junoo... la unua febra kuno Kaj magia stelpoem'... Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita Ĉion kronas per alpren'!

*Poemo el la antologio "Kroatia esperanta poemaro" – inspirita kaj verkita dum la restado de aŭtoro en Zagrebo.
("Vintro ĉe la zagreba lago Jarun" - fotis Ivan Špoljarec - Štef)*